# INTER★NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 261 Januaro, 2008

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — Kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20

✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫ ✫

## KANGURU-INSULO: PARADIZO BRULAS

Pramvojaĝo al Kanguru-Insulo daŭras unu horon, sed oni kvazaŭ sentus sin portita al antaŭa epoko. Antaŭ ĉirkaŭ 10.000 jaroj, leviĝo de la marnivelo disigis la insulon de la aŭstralia ĉeftero, kaj la aborigenoj de la insulo iom post iom formortis. Kiam eŭropanoj unuafoje atingis Kanguru-Insulon, ĝi estis senhoma. Nun, kvarono de la insulo, kiu estas longa je 155 kilometroj, estas protektata en naciaj parkoj. Ties arbaroj estas eble la plej de homoj netuŝitaj sur la tero.



Marleonoj ĉe Fokogolfo



Verda tapiŝo ĉe klifofirsto

La vegetaĵaro de la insulo estas diversa. En regionoj de bonaj grundo kaj pluvo, la arbaro estas tre neordinara; preskaŭ maltrairebla ĝangalo de eŭkaliptoj (sclerophyll rainforest). Aliloke troviĝas saletaj marĉoj. Proksime al klifoj - kiuj kaŭzis multajn ŝip-pereojn en la epoko de grandaj velŝipoj — la plantoj kune formas verdan tapiŝon. Eĉ eŭkaliptoj tie atingas nur 30cm (unu futon) de alteco, limigitaj de salaj ventegoj.

La plej granda „urbo” de la insulo havas 1.400 enloĝantojn. La ĉefaj industrioj de la insulo estas fiŝkaptado, terkultivado (plejparte por ŝafoj kaj bovinoj), eksportado de mielo kaj reĝin-abeloj (pur-rasaj ligurujaj), kaj nun, plej grave, turismo. Eĉ malnova industrio, distilado de eŭkalipt-oleo, reviviĝis por turistoj. Ĉi tiuj venas por vidi belajn pejzaĝojn, ekzemple la Mirindajn Rokojn kaj la Arkon de la Ŝiparestro, kaj birdojn kaj bestojn de la insulo — fe-pingvenojn, marleonojn, valabiojn, birdojn de Kabo Barren, ktp. La maro ĉirkaŭ la insulo estas malvarma sed riĉa; tie plonĝistoj povas vidi „foliecajn mardrakojn” (Phycodurus eques).




Foto de folieca mardrako, elĉerpita de la retejo: divegallery.com/Leafy _ Sea_Dragon.htm, kiun ni multe dankas.

Bedaŭrinde, homoj jam difektis la insulon. Nana emuo, specio priskribita de fruaj eŭropaj esploristoj, malaperis. Fokoj, marleonoj kaj balenoj estis preskaŭ formortigitaj de ĉasistoj en la dek-naŭa jarcento: la populacio de unu marleona specio nun re-kreskas, sed aliaj ne. Restas nur 3,000 balenoj de specio (Eubalaena australis) kiu ĉefe loĝas proksime al Ant-arktiko, kaj venas al aŭstraliaj marbordoj nur por nasko kaj amindumo. Sovaĝiĝ-intaj (ne-indiĝenaj) porkoj grave difektas arbarojn. Eĉ bonaj ideoj fuŝis; oni alportis protektendajn bestojn al Kanguru-Insulo en la 1950-aj jaroj, ĉar tie ne estis (eŭropaj) vulpoj. Sed la alportitaj koaloj tro bone sukcesis. Malmultaj eŭkalipt-specioj taŭgas por ili, kaj nun, la koaloj formanĝas kaj mortigas tiujn arbojn.

Eble la plej grava danĝero por Kanguru-Insulo estas plivarmiĝo de la klimato. Fajro, vekita de fulmo, ĉiam estis parto de naturo. Multaj aŭstraliaj plantoj evoluis por toleri fajrojn; eŭkaliptoj havas specialiajn subŝelajn burĝonojn, kiuj rekreskas post brulado .

Semujoj de multaj plantoj malfermiĝas nur post fajro, por restoki la grundon. Tamen, se fajroj estas tro oftaj aŭ tro ferocaj, resaniĝo de vegetaĵaro estas tre malrapida; kaj neprotektata grundo forbloviĝas. Oni povas kompari la foton de la surklifa „verda tapiŝo” kun foto farita unu jaron post la incendio; ĝis tiam nur eŭkaliptoj rekreskas en tiu malmilda loko.

Laŭ sciencistoj, severaj veter-kondiĉoj pli-oftiĝos, kaj arbaro-fajroj en Aŭstralio iĝos pli ferocaj. Al tiu kontribuos, sur la ĉeftero de Aŭstralio, la preskaŭa malapero de malgrandaj kanguru-specioj, mortigitaj de ne-indiĝenaj



La esperantisto en la foto de la Mirindaj Rokoj estas japano, NISIO Tutomu.

katoj kaj vulpoj. Antaŭe, ili formanĝis falitajn branĉetojn kaj foliojn; nun, ĉi tiuj restas sur la tero, kaj iĝas manĝaĵo por incendioj.



Arko de La Ŝiparestro kun fokoj sube

En decembro 2007, fulmoŝtormo kaŭzis multajn incendiojn sur Kanguru-Insulo. Estas malfacile tiujn halti en densa arbaro kun malmultaj vojoj. Kelkaj daŭris preskaŭ du semajnojn; junulo mortis en la lukto, kaj 90.000 hektaroj (200.000 akreoj) brulis. Pri vivaĵoj, kiuj ne povis rapide kuri aŭ flugi, la koro povas nur plori.



Pelikanoj kaj mevoj ĉe La Golfo de Emuoj (dromiceoj).

Tamen, arbaroj kaj vivaĵoj restas, kaj iom post iom la vundoj de Kanguru-Insulo resaniĝos. Venu vidi; indas.

— Margaret Furness, Mt. Barker, SA, Aŭstralio

Ĉiuj bildoj, krom tiu de la folieca mardrako, estas faritaj de la aŭtoro.

## *INTER NI* EN LA RETO

**Nova Jaro — Nova Epoko**

Ĉiuj numeroj de ***Inter Ni*** ekde januaro 2000 (numero 165) ĝis decembro 2007 (numero 260) estas nun legeblaj, eĉ haveblaj por elpresado, en la TTT (TutTera Teksaĵo), la elektronika inter-reto.

Por tiu granda atingo ni dankŝuldas al Boris-Antoine Legault en Montrealo. Li kreis la retlokon kaj metis en ĝin ĉiujn numerojn de ***Inter Ni*** el la lastaj 8 jaroj de eldonado.

La gazeto estas en formato „pdf" kaj pro tio estas legebla per programo „Adobe-Legilo" (angle, „Adobe Reader"). Vi devas instali ĉi tiun programon en via komputilo; tamen la programo estas libere havebla kaj senkosta.

Por legi aŭ elŝuti ***Inter Ni***, iru al retloko: **http://www.gazetejo.org/interni**. Tie vi trovos, en ses paĝoj, etajn bildojn de la numeroj haveblaj por elekti. Elektu per klakado unu numeron de ***Inter Ni***. Poste la programo prezentos al vi du elektojn: elektu tiun supran, nome „elŝuti" (angle, „download"). Nun aperas kesto, kiu demandas vin, ĉu „malfermu" (angle, „open with") aŭ „konservu" (angle, „save to

disk”) en via komputilo. Se vi deziras nur legi sur la ekrano, klaku ĉe „open”) por malfermi la tutan numeron de ***Inter Ni***.

Estas kvazaŭ miraklo, ke oni povas tiel facile nun trovi kaj legi vastan elekton el la numeroj de ***Inter Ni***. Tamen, ŝajnas ke tia estas kaj estos la elektronika epoko. Ni rekonas, ke la kreinto de la retloko estas Boris-Antoine Legault, brila stelo sur la horizonto de Esperanto, kaj iom fieras, ke li estas kanadano. Dankon al vi, samideano Boris-Antoine!

— Steĉjo

## PRI LA UNUA OLIMPIA LUDO EN LA JARO 776 ANTAŬ KRISTO, KAJ PRI LA NUNTEMPAJ

Nudaj ili kune staras ĉe l’startejo.
Nudaj ili kuras al la finlini’.
Kiu la batalon gajnas? plej rapidas?
Kiu venkas en ĉi Lud’ de Olimpi’?

Restas li heroo dum la tuta vivo.
Kaj apud la reĝo rajtas sidi li.
Kaj imposton pagi li neniam devas.
Laŭdas lin statuoj, multas poezi’.

Streĉe ili kune staras ĉe l’startejo.
Post la startilpafo kuras ili for.
Kaj vestitaj dece ili rapidegas.
Nur por unu estas la medal’ el or’.

Tiu heroiĝas / Tamen kiom longe?
Dum semajn’, monato? Poste nur silent’.
Oron li ricevas, kisojn sur la vangoj.
Malpli da imposto? Ne neniu cend’!

Amuzas ili tutajn hordojn
per ĉi konkursoj ludaj.
Ne min! Domaĝe, mi konfesas:
Mi ŝatus ilin . . . nudaj!

— Hein Wernik
Nijmegan, Nederlando